

Mensuel
Numéro 66
Juillet 2010

La SAGO
La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.*

Zone euro : 3,50 €
Suisse : 5 FS
Autres pays : 4,50 €

**Inter pokalo kaj ~~lipoj~~^{vipoj},
povas multe okazi.~Z**



Esperantistoj aktivas Japanio, el la reto...

Mi decidis organizi «Societon por parkere kanti la himnon Espero».

Dum longa tempo mi mem ne povis parkere kanti la himnon «Espero». Tio estas tre hontinda afero por esperantistoj, precipe por estraranoj de landaj asocioj kaj por veteranaj esperantistoj. Ni ne dependu de la kongreslibro, kiam ni kantas la himnon en la Inaŭguro kaj la Fermo. Ni kantu kun nia vizaĝo rekte direktita al la verda standardo. Kiam ni povos kanti la himnon parkere, ni povos havi pli da memfido pri nia Esperanto-kapablo. Ni povos senti, ke ni eniras en pli altan nivelon. Kongresoj estos pli viglaj kun laŭtaj voĉoj. Parkeraj kantadoj certe progresigos la movadon.

Nia organizo estu jene:

1. Estraro: (provizore) HORI Jasuo, HOŜIDA Acuŝi, TAHIRA Masako (ĉiuj estas japanoj) Poste ĉiuj landoj havu sian propran estraron.

2. Eldono de atestiloj

A - Ni, tri estraranoj, ekzamenos kandidatojn. Kiam ni konstatas, ke tiuj povas parkere kanti la himnon, ni donas al ili atestilon pri tio.

B. - Tiuj sukcesintoj havas rajton ekzameni aliajn kandidatojn, kaj kiam tiuj sukcesos, laŭ iliaj rekomendoj la Societo donas al tiuj novaj sukcesintoj la atestilon. Tiamaniere ni plimultigos la sukcesintojn.

C. - Se eblas, ni havos kunsidojn en diversaj kongresoj kaj seminarioj.

Ni atendas vian helpon kaj partoprenon en tiu projekto.

Hori Jasuo

Jen tute ne atendita frandinda humuraĵo el Japanio. Tamen, mi tuj transdonas la ideon al FEI, por ke ĝi estu parto de la ekzamenaro, ĉu kiel plia memstara ekzameno, ĉu kiel parto de la jam ekzistantaj (po unu strofo ĉe la tri unuaj gradoj, kaj la tuton kun la akuta G -Sol- por la «tiv» de la lasta vorto «efektivigo» ĉe *Altaj Studoj*), ĉu kiel plia fako por la *Atesto pri Supera Lernado*, nome *Atesto pri Kapableco Parkere Kanti la Himnon Espero*. Tio certe pli multe efikas ol enkonduki la Eŭropan Referenc-Kadron, kaj eĉ kostos malpli, ĉar oni bezonos nur verdan standardon, kio jam sufiĉe oftas en la ekzameno-centroj.

Serg' Sir'



Kolektiva trejnad-seanco por tiu ekzameno.

Setece kuiru ! La Makaroniaĵo («Macaronade»)

Dimanĉe, kiam la vetero belas, ĉiuj loĝantoj de Seto iras al la kabano («baraque») manĝi specialan pladon: la Makaroniaĵon. La kabano estas simpla dometo. La unuaj kabanoj konsistis el 4 fostoĵoj, ferlada tegmento kaj muroj el kanjoj. Estis ŝirmejo por la ĉevalo, la familio, la vinberrikoltantoj kaj la ĉasistoj. Nun ni nur povas vidi tiujn ŝtonajn dometojn meze de la vitoj (*Listel* aŭ *Picpoul de Pinet*). Kiam eblas la familio kaj la amikoj tie restas la tutan dimanĉon. Tie, ili eltiras el la korbo la ingrediencojn por la preparado de la plado.

Por 4 personoj:

Bova poplitaĵo (500g); 1 porka kotleto aŭ kolbaso; 4 maldikaj viandaj tranĉetoj.

Makaronioj (500g); - fromaĝo (parmezano).

Ladtomatoj 4/4 kaj malgranda skatolo da densigita tomato.

Ajlo - cepo - petroselo - salo - pipro.

Unue ni hakas cepon kaj viandon. La hakitan viandon ni metas sur la maldikan tranĉeton kaj ni kunligas per ŝnuretoj. Ni obtenas rultajn kaj farĉitajn viandaĵojn, kiujn ni kuiras en oleita marmito kun cepo kaj ajlo. Ni aldonas la du skatolojn da tomatoj.

En bolantan akvon ni jetas la makaroniojn.

Kiam la kuirado estas finita ni bele

prezantas la pladon: unue plado por la viandaĵo; due plado por la makaronioj; bovlo por la raspita fromaĝo kaj bovlo por la saŭco.

Bonan apetiton !

Ni povas ankaŭ anstataŭigi la viandon per marfruktoj.

Ĉiujare en Seto, konkurso kunigas la plej spertajn famajn gekuiristojn pri tiu plado, kaj juĝantaro elektas la plej bongustan makaroniaĵon. Kaj ĉiuj kune gustumas.

Redaktita, adaptita, tradukita
far C.B.E.

(Cercle Biterrois d'Espéranto)

laŭ

«Richesses et saveurs de l'Hérault»
de «Maguelonne»

(grupo de kamparaj virinoj).



Selle Humuraĵoj

Kie turismi hodiaŭ ?



Kun daŭrigo proponita de Lino Markovo,
kun teksto de Jak Le Puil...



Inter pokalo kaj lipoj, povas multe okazi.~Z

Post haŭt-tremetoj pro fiereco kaj orgojlo ĉe la unuaj notoj de la Marseljezo, kaj post haŭt-tremego pro kolerego kaj spitego ĉe la unuaj signoj de la disvenkiĝo, la ordinara subtenanto de la Franca Futbala Teamo ariĝas en densaj vicoj por bleke ĵeti koton sur la dekunuon⁽¹⁾ da fuŝaj sentaŭguloj, ĥoro enkadrigita de aro da respektindaj respondeculoj, de la plej etaj estroj de kamparaj sportkluboj ĝis la plej altaj instancoj de la Respubliko, la tuto subtenita de trumpetado far la paperaj kaj televidaj sport-mediaj bavistoj.

Kaj niaj sentaŭguloj, kapkline, ŝnuro ĉe la kolo, same kiel humilaj Kalesaj burĝoj, honteme pentis, kaj spontane sin punis rezignante — imagu! — la krom-pagon ligitan al ĉi monda konkurso.

Sed, fine, kion oni riproĉas al ili? Ĉu ili tro pigre ludis? Ĉu ili malstrategie organiziĝis? Ne! Ili simple perfidis la Valorojn de l' Sporto!

Kaj kiuj estas la valoroj de la sporto? Elektu mem kio plej gravas, inter flagismo⁽²⁾, absoluta respekto de la hierarkio, malreklamacia menso, kompleta sinofero, kaj samspekaj militecaj valoroj — valoroj, alte taksataj en la entreprenoj, kiujn nia ekonomia sistemo ne povas paŭtignori...

Ĉu mi ĥore ĵetu koton aŭ ĉu mi plendu tiujn dungitojn de la Sporta Industrio? Nu, ĉu vere temas pri dungitoj? Kvankam efektive dungitaj, oni ne povas konsideri ilin kiel banalaj

dungitoj. Rilate salajrojn: kelkaj lukras en unu monato la samon kiel unu mezklasa laboristo dum sia tuta vivo⁽³⁾... Rilate strikrajton: kiam pro malkonsento kun la estraro, ili rifuzis trejniĝi, neniu parolis pri striko, sed ja pri ribelo...

Fakte, tute ne temas pri proletoj, sed pri solduloj, «sandviĉ-homoj» ideologi-propagandistoj, inter du reklamaj paneloj⁽⁴⁾.

Kaj kia ideologio! Evidente ne: «Sporto estas bona por la sano», pri kio, neniu plu kredas. Efektive, ĉu eblas kredi je tio, kiam oni vidas la aregon kuracistan kaj paramedicinan necesan por flegi sportiston — ja se sporto plibonigus la sanon, je kio utilis kuracisto? Ankaŭ bokso sin diras sporto. Kiu povas kredi, ke ricevi bategojn sur la nazon laŭlonge de longaj horoj povas sane bonefiki? Sen paroli pri la ĥemiaĵoj, kiuj subfosas ĉion kaj ĉiun en tiu Mondo.

La afrikaj knaboj, malnaive ne eraris pri la mesaĝo, kiu estas ece mona. Tamen ili falis, kaj plu falas, en la kaptilon de l' oro, kiu brilas, kiel brilas la suno en la speguloj por alaŭdoj. Senskrupululoj arigas la plej lertajn, malkovritajn en la Afrikaj suburbaj vakejoj, kaj sendas ilin Francien sub la iluzia promeso de sporta sukceso. El tiuj enmigrantoj, la sportaj kluboj eltiras la kremon, kaj forlasas la ceteron (ĉ. 70%), kiu plej ofte ne reiras Afriken, kaj pligrandigas la amason da senrajtigilaj enmigrantoj.

Serĝ' Sir'

Notoj:

⁽¹⁾ Fakte iom pli, ĉar, samekiel por aŭtomobilo oni bezonas kromradon, sporta teamo bezonas kromteamanojn kaze de difektiĝo...

⁽²⁾ **Flagismo:** amo, fideleco, obeemo, submetiĝo, unuvorte vasaliĝo al io, ĝenerale bildigita per sankta flago aŭ io simila, kiel ŝildo aŭ logoo: unuarange la nacioj, sed ankaŭ la urboj, la kluboj, kaj eĉ la entreprenoj. La entreprenistoj nomas «*Entreprena spirito*» la firmaan flagismon.

⁽³⁾ Averaĝa salajro de franca unuaranga futbalisto («*ligue 1*») estas 40 000 € monate.

⁽⁴⁾ La ĉemizo de unuaranga futbalisto luiĝas jare ĝis 6 M€ al firmao por ke ties nomo aperu sur unu flanko de la ĉemizo. (Nur unu, evidente!)

Enhavo

- 1, Kovrilpaĝo Inter pokalo
 - 3 kaj...
 - 2 Esperantistoj aktivigas Sete kuiru Selle-humuraĵoj
 - 4 Kontrolata socio (2a parto)
 - 5 Praktikaj informoj
 - 5-6 Kiel traduki: «Rang»
 - 6 Libro-Servo
- Supplément en français**

 - 7 Le film «Espéranto»
 - 8-10 Dans la presse. et ailleurs...
 - 10 Rencontres espérantistes d'été.
- 11 Nuklea energio...la glavo de Damoklo.
 - 12 Legindaj Legendoj Kontribuo al Vikipedio
 - 13 Libroj vivas pli longe ol unu sezono
 - 14 Eĥoj el Hiliono El nia leterkesto
 - 15 Esperantistoj aktivigas:
 - 16 Pirataĵoj:
 - Aventuroj de iu T-ĉemizo..
 - Ĉe la galo, devojige...

Grava historia malkovro



Partoprenis en ĉi numero: (laŭ alfabeto ordo)

Andreo	Andrio	Jasuo	Hori
Elisabeth	Barbay	JoLo	Ko
J.	Barratié	Ĵak	Le Puil
Hélène	Caous	Franjo	Leveque
Klod		Lino	Markovo
Dominique	Gauthier	Vito	Markovo
Jean-Leon	Gerome	Edmond	Plutniak
Louis	Gohin	Jean	Selle
José	Grammatico	Serĝo	Sir'
Henri	Graven	Juliette	Ternant
Phil'	Guichet	Cercle Bitérois	d'Espéranto

Kontrolata socio (dua parto)

Hodiaŭ 1500 municipoj estas sub videokontrolado (fr: *vidéo-surveillance*). En la daŭro de 2 jaroj, la ŝtato elspezis pli ol 35 milionojn da eŭroj, por kuraĝigi magistratojn, kiuj deziris ekipi municipon per kameraoj kaj kontaktigi ilin kun la loka policejo aŭ ĝendarmejo. En la daŭro de 6 jaroj, 200 kompanioj, kiuj fabrikas kaj instalas sistemojn de videokontrolado, partigas inter si merkaton, kies spezo ŝvelis de 473 milionoj da eŭroj ĝis pli ol 750. Oni jam nombras 396 000 kameraoj sur diversaj lokoj en Francio: en aŭtobusoj, stacidomoj, superbazaroj, bankoj, vestibloj, liceoj, publikaj vojoj ktp. En Britio, estas instalitaj 25 milionoj da kameraoj, sed en la jaro 2009 la londona polico, tiel nomata Scotland Yard, konfesis, ke la videokontrolado ebligis solvi surstratajn ŝtelojn nur en la nombro de 3 procentoj. En Francio, en la jaro 2005 la Generala Inspektoservo de la Administracio raportis pri la koncerna temo kaj konkludis, ke «politiko por ĝeneraligata ekipado ne estas la dezirinda orientado dum la venontaj jaroj» kaj, ke «laŭ agopreta vidpunkto, la kontraŭterorisma polica strategio ne devige plifortiĝus pere de tre larĝa kovrado de la teritorio. Se tro da kameraaj bildoj ne malaperigas ĉi-tiujn lastajn, tio almenaŭ limigas la eblon ekspluati en komprenebla maniero tro abundan bildokvanton».

Societo por industria-komerca esplorado kaj protektado povas enŝovi siajn enketistojn en la personaron de entreprenoj sekve de peto farita de la direktantaro de ĉi-tiu lasta. Enketistoj de tia societo estas dungitaj de interesata entreprenoj por minimume 2 monatoj kaj la daŭro de ilia kontrakto povas pli longiĝi ĝis 6 monatoj. Dum la unua monato, enŝovito provas plaĉi al la personaro, por ke oni deziru paroli kun li. Dum la dua monato, enŝovito ĉiutage korespondas kun la direktisto, kiu tiel plene informiĝas pri la personaro de sia entreprenoj: tro parolema sekretario, mallojala kadrulo, laboranto pigra aŭ sekrete helpanta laborsindikaton... La komisiaro de enŝovito povas konduki al pridemandado aŭ maldungo. En la jaro 2002, la Kasacia Kortumo, kiu devis decidi pri la valideco de maldungo sekve de enketo farita de enŝovito, ne kritikis la principon de la enŝovado en entreprenon pro la kaŭzo, ke la societo por industria-komerca esplorado ne kontraŭleĝe disponigis salajrulon, sed estis ligita kun la interesata entreprenoj per kontrakto pri havigo de servo.

De proksimume 20 jaroj, agopreparaj agentejoj (fr: *officines*) praktikas privatan informigadon. Ili estas estrataj de forlasintoj aŭ emeritoj de diversaj policaj

servoj. Ili profesia estinteco ebligas al ili utilajn rilatojn kun eksaj kolegoj, kiuj funkcias plu kaj povas konsulti policajn dokumentarojn. Iuj el tiuj preparoservoj specialiĝis sur la kampo de aktivajoj, kiuj estas oficiale malpermesitaj al ili: telefona subaŭskultado, gvatsekvado, konsultado de bankaj kontoj, de justicaj dosieroj, de policaj aŭ ĝendarmaraj dokumentaroj, por scii, ĉu la koncerno estas konata de la policaj servoj, identigo de aŭtoj kaj domiciloj, kontrolado pri renkontiĝoj.

Oficiale, kiuj petas tiajn agopreparajn agentejojn, tiuj havas honestan intencon: defendi sian entreprenon kontraŭ eksteraj misfaroj aŭ pliscii pri la metodoj de konkurencoj. Tamen ili povas ankaŭ provi malestimigi politikiston pere de serĉado en lia intima vivo aŭ timigi sintrudulon. Ekzemple en la jaro 1998, fakulo spitis grandajn kompaniojn por akvodistribuo, ĉar li helpis magistratojn denove trakti la kondiĉojn de kontraktoj, por malaltigi tarifojn; du armitaj varbitoj, kiuj ricevis la taskon minaci kaj silentigi la koncernen fakulon, estis oportune arestitaj, sed la ĉefaj financintoj de la afero ne estis zorgigitaj. Alia tasko de agopreparaj agentejoj konsistas en kontrolado de la aktivajoj de afrikanoj, kiuj opozicias al la reĝimo reganta super ilia lando, kaj en sekvado de la iroj de ĵurnalistoj, por ekscii pri iliaj informfontoj. La kolektitaj informoj havas ofte du adresatojn, ĉar multaj el la agopreparaj agentejoj estas en intima rilato kun ŝtataj servoj. Tiu aranĝo, por meti kontraŭleĝulojn en la servon de leĝuloj, kontentigas multajn homojn. Tamen de majo 2009, la agopreparaj agentejoj kaj iliaj direktantoj estas submetigitaj al prefekta aprobo.

De la jaro 2005, la Direkcio por la Impulsado de Esplorado, Studado kaj Statistiko (fr: *Direction de l'animation de la recherche, des études et des statistiques - Dares*), kiu dependas de la ministro pri socialaj aferoj, ĉesis publikigi la nombron de la maldungitaj laborsindikataj reprezentantoj aŭ elektitoj al entreprenaj komitatoj. Kvankam sekreta, la koncerna statistiko estas farata kaj montras, ke proksimume 10 000 personoj estas ĉiujare maldungitaj spite admonojn de la Internacia Organizaĵo por Laboro (fr: *Organisation internationale du travail - OIT*) aŭ la franca registaro. Por maldungi tro aktivan sindikatiston, sufiĉas, ke mastro petu laborinspektiston pri permeso. Generale la koncerna oficisto rifuzas, escepte en okazo de grava peko farita de la sindikatisto. Tiam mastro povas fari peton pri decidonuligo (fr: *recours gracieux*) al la ministro, kiu plejofte plenumas ĝin. Pli kaj pli da socialaj protestoj kondukas al pordispona gardo de suspektatoj (fr: *garde à vue*) aŭ al tribunalo. Okaze de procesoj kontraŭ sindikatistoj, la prokuroroj ofte postulas ekzemplodonajn punojn. Tamen konsidere la fakton, ke juĝistoj

trudis al dungintoj «reĝustigon» de la kariero de maldungitaj sindikatistoj pere de imponaj kompensoj, grandaj entreprenoj provas asociiĝi kun la plej aktivaj el la sindikatistoj. Leĝo farita la 20-an de aŭgusto 2008, koncerne la laborsindikatan reprezentivecon, preskribas validigon de la interkonsentoj inter la dungantoj kaj la laboristaj organizaĵoj reprezentantaj la voĉdonintojn en la nombro de almenaŭ 30 procentoj okaze de profesiaj balotoj



kiofaciligas aranĝojn inter la grandaj laborsindikatoj kaj la mastraro.

Funkciantaj aŭ ne, la poŝtelefonoj elklikas la relajsokolonetojn (fr: *bornes-relais*), kiuj troviĝas proksime de la vojiro de posedanto. La polico povas informiĝi ĉe la telefonaj operatoroj pri la relajsokolonetoj, kiuj ricevis la efikon de difinita numero, kaj pri la datoj kaj horoj. Serĉante en la pasinteco, oni povas sekvi la antaŭajn vojirojn de la spionitaj personoj, ĉar leĝo devigas la telefonajn operatorojn konservi dum unu jaro la memoron pri la spuroj de la poŝtelefonoj, kiujn ili prizorgas. Por scii pri rendezuoj, sufiĉas, ke oni malkovru la aliajn poŝtelefonojn, kiuj elklikis samtempe la saman relajsokoloneton. Se oni konstatas, ke per la samaj numeroj personoj antaŭe vokis unu la alian plurfoje, montriĝas probableco de renkontiĝo de la koncerna posedanto de poŝtelefono. Tamen la personoj, kiuj volas eviti tian spionadon, devas de tempo al tempo malkonekti la baterion de sia poŝtelefono.

La uzantoj de kolektivaj transportoj, kiuj forlasis la ordinarajn biletojn kaj adoptis blatkarton (fr: *carte à puce*), aŭtomate estigas elektronikan impulson sisteme registratan kaj tenatan en komputilo. Sufiĉas, ke oni enmetu la numeron de blatkarto, por videbligi ĉiujn tagojn, horojn de vojiroj kaj haltoj de la koncerna vojaĝinto.

En magazeno, tuj kiam uzanto de bankokarto tajpas sian kodon, ĝia aĉeto estas registrata en komputilo de la Grupiĝo por la Ekonomia Intereso de la Bankokartoj. La polico tiel povas informiĝi pri ĉiuj bankaj modifaĵoj (aĉetoj, retratoj, sumotranslokadoj). Por optimigi la administradon de stokoj, laŭ la dirmaniero en la merkato, la informdikaj sistemoj de magazenoj memortenas en kuniga maniero la numerojn de bankokartoj kun la strikodoj de aĉetitaj varoj. Tio ebligas havi tipan prezenton de konsumantoj.

(daŭrigota)
Jean Selle

Noto.

La elementoj de tiu artikolo fontas el la enhavo de broŝuro titolita «*Je te vois!*» *Comment nous sommes tous sous surveillance*, aperinta en junio 2009 kaj apartenanta al la kolekto *Les dossiers du Canard* (173, rue Saint-Honoré, 75001 Paris)

Praktikaj informoj

Sidejo:	Lunde	18h30 - 19h30
dejour-	Marde	10h00 - 16h00
horoj	Merkrede	14h30 - 18h00
	ĵaŭde	15h30 - 18h30
	Vendrede	09h30 - 19h30
	Sabate	11h00 - 18h00

■ Kursoj.

Por la unua grado, vidu lastan paĝon de la franclingva suplemento.

Ĉe la sidejo:

Parolaj perfektigaj kursoj dua grado: ĉiun merkredon, je la 16a, kun Phil Guichet, **ĉiun ĵaŭdon**, je la 15a, kun Élisabeth Barbay, kaj **ĉiun vendredon** je la 17a kaj duono, kun Vito Markovo.

Trigrado: ĉiun sabaton, je la 16a kun Vincent Charlot.

La Babilrondo de SAT-Amikaro okazas **ĉiun duan merkredon** de la monato, je la 11h45 gxis 14h30 kun Thérèse Pinet.

■ **Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado:** Claude Gerlat

38 €. (senlaboruloj kaj ĝis25jaraĝaj junuloj: 19 €.) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

Pedagogio: Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

Kotizoj 2010 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,60 €; Svisio: 3,80 F.S.; aliaj landoj: 4,60 €.

Abono 2010 al la revuo, sen aliĝo al SAT-Amikaro: Francio, Belgio: 32 €; Svisio: 43FS; aliaj landoj: 39 €.

Por pagi:

■ **En Francio:** SAT-Amikaro
CCP: 37 852 90 L La Source.

(Ĉekoj al la kasisto: Guy Martin)
IBAN, (por pagi el eksterlando):
SAT-AMIKARO.

FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314
BIC: PSST FRPPSCE

■ **En Belgio:** Claude Gladly:

Bankkonto N° 750-6373051-18

IBAN B50 7506 3730 5118 BIC: AXABBE22

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean:

Poŝta konto n° 23-14908-9.

La SAGO: Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.

Ĉefredaktanto: Vito Markovo.

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Redakt- kaj korektskipo: Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir'.

Helpas al la korektado: Janine kaj Yannick Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet, Lino Markovo.

KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:

■ Prefere per reto, al lasago@free.fr, **tekstoj** en RTF aŭ TXT formo por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj per ajna sistemo de ĉapeligo (sed Unikodo preferata), bildoj en TIFF, JPEG aŭ GIF formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir' (ne tajpitaj kontribuoj publikeblas nur se troveblas volontula tajpanto)

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Adresaro

La SAGO-abonoj: ĉe Guy Martin,

La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.

Sidejo de SAT-Amikaro: 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris

Tel.: 01 44 24 50 48 kaj 01 44 24 50 02

TTT-ejo: www.sat-amikaro.org

Reto: sat-amikaro@wanadoo.fr

Claude Gerlat 11 bd Maréchal Leclerc 38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Reto: claud.gerlat@orange.fr

Claude Gladly: Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine; Reto: cglady@arcadis.be
Tel: 071/64 49 16 (en Belgio).

Mireille Grosjean: Grand-rue 9, CP 9 CH-2416 Les Brenets

Guy Martin: 3 rue Voltaire

22000 Saint-Brieuc

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy

Reto: lasago@free.fr

SAT

Abono al "Sennaciulo" 2010: 57 €

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

Kiel traduki Rang

Ni ekzamenu hodiaŭ la vorton **rang**, kaj la derivaĵojn **ranger** kaj **rangé**. La plej oftaj tradukoj uzas la radikojn **vic-**, **rang-**, **ord-**, **flank-** kaj **kondu-**, sed en iuj okazoj aliaj vortoj estas pli trafaj.

■ Kiam **rang** signifas serion de objektoj aŭ estaĵoj aranĝitaj unu apud alia, ĝi tradukiĝas per **vico** aŭ ties kunmetaĵoj, plejofte sed ne ĉiam:


Un collier à trois rangs de perles.	Kolĉeno kun tri perlovicoj.
Les sièges du premier rang.	La seĝoj de la unua vico.
Tricoter un rang à l'endroit, un rang à l'envers.	Triki unu vicon rekte, unu vicon malrekte.
Marcher en rang par deux.	Marŝi po du en vico.
Dormir dix heures de rang.	Dormi dum dek sinsekvaj horoj.
Serrez les rangs!	Densigu la vicojn!
Rompres les rangs.	Disiĝi.
Rompres les rangs!	Dise!
Silence dans les rangs!	Silentu, en la vicoj!
Se mettre sur les rangs.	Enviciĝi inter la konkurantoj.
Grossir les rangs des mécontents.	Enviciĝi inter la malkontentuloj.
Les militaires du rang et les gradés.	La simplaj soldatoj kaj la ranguloj.
Rentrer dans le rang.	Rezigni sian ambicion; rezignacii.

■ Kiam **rang** esprimas la interaranĝon de objektoj aŭ estaĵoj, sen hierarkia senco, ĝi tradukiĝas per **ordo**, per **klaso** aŭ per **vico**:

Des livres classés par rang de taille.	Libroj klasitaj laŭ la formato.
Se présenter par rang d'âge.	Sin prezenti ordigitaj laŭ sia aĝo.
Il a pris rang parmi les académiciens.	Li enviciĝis inter la akademianoj.
Mettre ce vin au rang des meilleurs.	Envicigi tiun vinon inter la plej bonaj.

■ Kiam la vorto **rang** esprimas hierarkion, ĝi tradukiĝas per **rango**:

Un fonctionnaire d'un certain rang.	Ŝtatoficisto ĉe certa rango.
Un écrivain de second rang.	Duaranga verkisto.
Le rang social de quelqu'un.	les rango en la societo.
Tenir son rang.	Teni sian rangon.
Mettre sur le même rang.	Meti ĉe la saman rangon.



LibroServo

Sat-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
 Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;
 Sabate 11H-18H)
 Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org
 CCP : Sat-Amikaro Libroservo Paris 261211 57 G



Sendkostoj
 Al ĉiu mendo
 aldonu:
 40% ĝis 5€
 35% ĝis 10€
 25% ĝis 20€
 20% ekde 20€


Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj	7,00
Kasedo de Junulkurso, internacie uzebla	7,00
Espéranto Éclair (Raymon Gueguen)	4,00
Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché	10,00
Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat)	6,00
Communication linguistique (Claude Piron)	5,00
Une humanité, une langue (Simone Glodeau)	2,30
La langue internationale (Raymond Gueguen)	8,00

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

Novaj

BONA ESPERO, idealo kaj realo

Verkita de Roman Dobrzynski laŭ interparolo kun Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia.



2006-2007: Roman Dobrzynski iris al Brazilo kiel volontulo dum kelkaj monatoj por verki libron pri «Bona Espero»

«Bona Espero estas komunumo kaj bieno-lernejo por malriĉaj infanoj en Alto Paraíso, Gojaso, Brazilo.» http://eo.wikipedia.org/wiki/Bona_Espero.

«Intervjua formo ebligas perdemandoj libere stiri rakontadon, laŭvole ŝanĝi temojn, salti de fakto al fakto kaj saturi la enhavon per anekdotoj» klarigas la verkisto en la antaŭparolo.

Eldonis Stano Marček

2008 - 256 paĝa inter kiuj 20 paĝoj de koloraj fotoj. 15 €.

■ La signifoj de la verbo **ranger** spegulas la diversajn signifojn de **rang**, do ni ofte retrovos en la tradukoj la radikojn **vic-** kaj **ord-**, sed ankaŭ aliajn:

Ranger ses affaires.	Ordigi siajn aĵojn.
Tout est bien rangé.	Ĉio estas bone ordigita.
Des mots rangés par ordre alphabétique.	Vortoj alfabete ordigitaj.
Ranger sa chambre.	Meti ordon en sia dormoĉambro.
Cet auteur est à ranger parmi les classiques.	Tiu aŭtoro estas enviciginda inter la klasikuloj.
Ranger sa voiture sur le bas-côté.	Flankenigi sian veturilon sur la vojrandon.
Rangez-vous par trois.	Enviciĝu po tri.
Se ranger contre le trottoir.	Flankenigi ĉe la trotuaro.
Se ranger du côté de quelqu'un.	Partianiĝi al iu.
Se ranger à l'avis de quelqu'un.	Aprobi ies opinionon.
Après son mariage, il s'est enfin rangé.	Post sia edziĝo, li fine bonkonduktiĝis.

- Effectivement, j'aime ranger mes affaires
 - En fait, je me suis rangé à tous ses avis !



■ La adjektivo **rangé** alprenis figurajn signifojn, kiuj postulas aliajn tradukojn:

La discussion dégénéra en bataille rangée.	La diskutado degeneris en ĝeneralan batalon.
C'est un homme rangé.	Li estas (nun) bonkondata viro.
Il mène une vie rangée.	Li kondutas kiel seriozulo.

Andreo Andrio



Fake: Heraldiko

far Sir'

La franclingva heraldika vorto **rangé** tradukiĝas tute regule per **vicigita**. Ĝi uziĝas kiam la elementoj de aro da surmetaĵoj estas vice aranĝitaj laŭ rekta linio.

De sable à trois fleurs de lys **El sablo kun tri lilioj el d'oro bende vicigitaj.**

Espéranto: vers une culture sociale sans frontières

Un projet «Coopérative SAT-EFK»

Le film-documentaire «Espéranto»

■ Comme annoncé dans La SAGO 63, le tournage du film a déjà commencé et les premières préventes ont lieu. Pour vous permettre de suivre pas à pas la réalisation du projet et assurer la diffusion du film, le site officiel du film est régulièrement mis à jour :

<http://esperantofilmo.com>



■ Une vidéo de 3 min avec les premières images du tournage y est même déjà visionnable (<http://esperantofilmo.com/spip.php?article5>).

■ Pour pré-commander le film, rendez-vous sur : <http://esperantofilmo.com/spip.php?article8>.

L'utopie, c'est la vérité de demain.

Victor Hugo

Note d'intention

L'objectif de ce documentaire est de faire connaître au plus grand nombre l'espéranto. Il y a une grande méconnaissance de ce sujet. Et, quand l'espéranto est connu, il est chargé de préjugés négatifs ou au mieux de désintérêt. Il ne s'agit pas de faire de la propagande pour la langue et les idéaux qui s'y rattachent, mais plutôt d'amener le public à réfléchir et par là même à adopter un regard bienveillant sur l'espéranto. La réalisation d'un documentaire comme celui-ci est un projet ambitieux qui doit tenir compte d'une règle importante : aiguïser la curiosité du spectateur et l'émouvoir. Schématiquement il faut autant d'information que d'émotion. La durée, environ 60 minutes, ne permet pas de tout dire. Au niveau des contenus, les choix se porteront sur les éléments qui caractérisent le mieux l'espéranto et ses valeurs, et au niveau de la forme, les situations les plus vivantes et les plus illustratives.

Synopsis

Avec son histoire, son esprit, sa démarche, son idéologie, Zamenhof est un personnage hors du commun. Au sens cinématographique, c'est un « héros » qui attire l'intérêt et la sympathie. La structure du film est construite à partir de l'histoire de l'espéranto et de son inventeur. Chaque séquence importante de l'histoire renvoie à une situation présente.

Traiter l'histoire de l'espéranto tout au long du film a plusieurs avantages : faire découvrir l'histoire sans ennuyer avec une séquence trop longue, lier l'histoire au présent, la démarche de Zamenhof au militantisme d'aujourd'hui, aborder l'organisation du mouvement et sa structure sans lourdeur, montrer comment l'utopie de Zamenhof se retrouve dans la réalité, lui donner la parole par des citations jouées en off par un comédien, mettre en valeur la filiation et faire ressortir l'adaptation de l'espéranto au monde moderne, jouer formellement sur des ruptures d'ambiance et de rythme.

Le choix des grands thèmes abordés dans ce documentaire permettra de rendre compte de la vie de l'espéranto aujourd'hui : la communication internationale, les origines de l'espéranto, sa création et les objectifs de L. Zamenhof, la structure de la langue, l'enseignement, l'idéologie, les Congrès passés et récents, l'organisation du mouvement, la production culturelle, le développement de la langue et ses différentes utilisations (réunions et colloques internationaux, les voyages, la langue maternelle...), sa reconnaissance par des organisations internationales et par des intellectuels, l'avenir de l'espéranto (les espoirs et les actions engagées).

La dimension universelle de la langue est apportée par les séquences tournées dans différents pays (France, Pologne, Allemagne, Autriche, Suisse, Hongrie, Roumanie, Cuba) et l'utilisation de nombreux témoignages d'espérantistes de toutes nationalités.

Les matériaux utilisés pour ce film sont assez classiques dans un documentaire :

entretiens filmés, illustrations générales, situations particulières, commentaire en voix off, citations d'auteurs par la voix d'un comédien, archives photos, films anciens et récents, vidéo, gravures, archives sonores, mais aussi le graphisme et l'animation pour traiter certaines séquences, comme par exemple la structure de la langue.

L'illustration musicale sera puisée dans les ressources de la production et de l'édition espérantiste.

Pour répondre à son objectif le film s'appuie sur des situations vécues, porteuses de sens et d'émotion, et révélatrices d'un esprit humaniste.

Les entretiens filmés proposent des démarches et expériences individuelles, des compléments, des explications ou des analyses de certains faits historiques ou actuels et les propos de certains « experts ».

Dominique Gautier



■ Les 8 et 9 mai, Boulevard du Temps Perdu on n'a pas perdu son temps. En effet, c'est à la Maison des Associations de Manosque que se déroula le Rassemblement Régional de l'Espéranto. Les délégués des 15 groupes de Provence se retrouvèrent, le samedi matin dès 9H30. Après une brève collation, débuta en salle A une conférence en espéranto ayant pour thème «le changement climatique et le sommet de Copenhague 2009». En face salle C, un cours de conversation. Le midi, rassemblement des participants et repas convivial tiré du sac.

Le samedi après-midi, suite du cours de conversation, pendant que, en salle A, débutait une conférence sur l'histoire et la géographie de la Russie, sa littérature, ses langues.

A 21H30 retour en salle C où se déroula une soirée consacrée aux chansons de tous styles. Ensuite dodo chez l'habitant ou à l'hôtel.

Le dimanche matin, tous au congrès avec l'élection du nouveau Conseil Régional. L'après-midi le groupe restant se transporta sur le côté gauche du Forum, devant la plaque de la rue dédiée à Louis Lazare Zamenhof le créateur de l'espéranto. Là, après les photos d'usage, chant de l'hymne européen, toujours en espéranto sur les notes de la 9^e symphonie de Beethoven. Ensuite, visite du vieux Manosque et dispersion.

L'Association EKEM (Esperanta Kulturo En Manosko) et la Fédération Régionale d'Espéranto remercient chaleureusement la CCLDV (Communauté de Communes Luberon Durance Verdon), la Mairie, Monsieur le Maire de Manosque et le Service Culturel pour leur part au bon déroulement de la rencontre.

José Grammatico

■ La Tribune - Le Progrès - 29 mai 2010 - Avec l'espéranto, pas besoin d'interprète!

Cette langue, inventée de toutes pièces en 1887, permet à « tous les citoyens du monde de communiquer entre eux. Explications avec le secrétaire du Club espéranto stéphanois



C'est une langue méconnue en France. Pierre Grollemund le sait. L'espéranto, pourtant langue internationale, est plutôt confidentiel. Pourtant, ce Stéphanois de 60 ans le parle depuis trente-cinq ans...

Source :

<http://www.leprogres.fr/fr/permalien/article/3218442/Avec-l-esperanto-pas-besoin-d-interprete.html>

■ Ouest-France - 17 juin 2010 -

L'espéranto, une langue qui dépasse toutes les frontières. Couëron



Apprendre l'espéranto a conduit le Couëronnais Maurice Foucher (à gauche) à un projet d'électrification en Tanzanie

Pour le Couëronnais Maurice Foucher, l'espéranto est une langue qui peut mener à tout. Il la parle depuis 10 ans, car plus jeune, il a entendu parler de l'intérêt de ce moyen de communication. « C'est un outil incroyable pour parler à tous, et par ce biais, nous pouvons recevoir le monde entier. C'est une langue humaine, de contact, sans supériorité, avec une facilité d'apprentissage que l'on ne

rencontre nulle part ailleurs », indique Maurice Foucher. Son étude demande 7 à 10 fois moins de temps qu'une autre langue, puisqu'elle est phonétique, sans irrégularité ni exception.

C'est une langue neutre qui n'appartient à aucune nation en particulier. On compte plusieurs millions de locuteurs dans plus de 100 pays. « En apprenant cette langue, chacun fait un pas vers l'autre pour communiquer. Elle amène ceux qui la parlent à se rencontrer sur un pied d'égalité », ajoute Maurice Foucher. L'idée qui a conduit à la création de l'espéranto est ainsi la recherche de la tolérance et du respect entre les hommes des divers peuples et cultures.

Ce pas, Maurice Foucher, retraité, l'a franchi en rencontrant M. Mramba Simba Nyamkinda, président de l'association Mazingira, qui effectuait des tournées en Europe auprès de diverses associations, grâce à l'espéranto, dans le but de faire connaître les besoins des villageois de la communauté de communes de Salama (Tanzanie), dont il est le maire. « J'ai alors marié l'Afrique, l'espéranto,

et Électriciens sans frontières, moi-même ancien formateur d'électriciens dans les Télécom. » Après une mission d'identification et des débats de villageois, un projet d'électrification de dispensaires - écoles a été choisi à l'unanimité, en préférence au forage de puits. « Ceci est indispensable pour la qualité des soins notamment, et permettrait l'usage d'ordinateurs, de téléphones portables, etc., soit un projet de 47 000 € avec des aides préacquisées. Nous aidons à la mise en place du système, qu'ils souhaitent poursuivre. »

Jeudi 17 juin, à 18 h salle « le Dix », conférence en espéranto traduite en français sur les coutumes, fêtes et traditions en Chine. Elle sera menée par M. Peng et le Centre culturel Nantes espéranto.

Source :

<http://www.ouest-france.fr/actu>

■ **Ouest-France** publie le 18 juin un article intitulé

Gaby Tréanton pratique l'espéranto depuis 74 ans.



Mercredi, ses amis espérantistes, avaient organisé une réception en l'honneur de Gabrielle Tréanton. Cette dernière fêtait ses 90 ans et son attachement à la langue universelle depuis 1936.

« Gaby », comme l'appellent tous ses amis, est originaire de la région de Guingamp. Très tôt, elle s'est inquiétée de savoir comment on allait accueillir les réfugiés au sortir de la guerre d'Espagne. Son père lui suggère de communiquer en espéranto. Ce sera son premier contact avec la langue, initiée par le docteur Ludwik Lejzer Zamenhof, à la fin du XIX^e siècle.

Dix ans plus tard, « Gaby », tout en exerçant son métier d'institutrice, apprend cette langue en autodidacte. Après avoir enseigné à Bréhat, Lanvellec, elle termine sa carrière d'institutrice à Saint-Quay-Perros. Dès lors, elle a consacré sa vie à l'espéranto. Elle l'enseigne, gratuitement, et reçoit ses élèves dans sa coquette demeure kénanaise. « Mon premier élève était un Suédois », dit-elle.

Les amis de « Gaby » ne tarissent pas d'éloges sur celle qui a fêté ses 90 ans, le mois dernier, lors d'un congrès international d'espéranto en Allemagne : « C'est une personne humaniste, citoyenne du monde qui aime et s'intéresse aux gens. »

« Saint-Quay-Perros a toujours été réceptive à l'espéranto. Nous avons toujours bien reçu quand nous avons accueilli des étrangers, notamment après la guerre de Bosnie. Je remets donc aux représentants de la municipalité, le diplôme de l'étoile verte de l'espéranto (1) », annonce Gabrielle Tréanton, à la fin de la cérémonie en son honneur.

(1) Étoile à cinq branches, représentant les cinq continents, et verte (la couleur de l'espérance).

<http://www.ouest-france.fr/actu>

■ **Ouest-France** - 07 juin 2010

Saint-Nazaire labellisée Ville espérantiste



Éric Provost, adjoint à l'attractivité, présente le label Ville espérantiste décerné à Saint-Nazaire. Sur le diplôme, trois « verdaj esperantistaj steloj », symboles d'excellence.

«Ĉi tie informiletoj en Esperanto» : ici, informations en espéranto. L'inscription figure sur la vitrine de l'office de tourisme. «Un témoignage de notre ouverture sur le monde et une contribution complémentaire à notre attractivité.» Ainsi Éric Provost a-t-il qualifié, vendredi soir à l'office de tourisme, le label Ville espérantiste, attribué à notre cité par la revue *Esperanto-info*. «Une reconnaissance de notre dynamisme», s'est réjouie pour sa part Françoise Griffon, présidente du Centre culturel Saint-Nazaire Espéranto, avant de remettre officiellement le diplôme au maire-adjoint.

L'association a en effet collaboré avec la structure Saint-Nazaire tourisme et patrimoine pour rédiger des feuillets, à l'intention des visiteurs pratiquant la langue internationale conçue à la fin du XIX^e siècle par Zamenhof. Sujets pour l'instant retenus : l'origine de la ville, la construction navale et le tumulus de Dissignac. Ces fiches sont désormais disponibles à l'office, sous la base des sous-marins.

Source : <http://www.ouest-france.fr>

■ **Presse Océan** publie le 08 juin un article au contenu analogue.

■ **La Montagne** du 07 juin publie un article intitulé **Un congrès entre espérantistes**, relatant le congrès commun de *Esperanto-France* et la *Germana Esperanto-Asocio*, à Kaiserslautern, en Allemagne.

Source : http://www.esperanto-sat.info/IMG/jpg/2010_06_07_La_Montagne_KL.jpg

■ Un «remake» video (très soft) de «*A Femme avare, galant Escroc*» des «*Contes grivois*» de Jean de la Fontaine, en espéranto, sous-titre français, chez Youtube:

Morgana et Elizabeto se préparent pour sortir, quand on sonne à la porte. Morgana va ouvrir



La morale pouvant être : **il n'y a pas de gain à montrer ses appâts par appât du gain...**

Communiqué par J. Barratié

■ **La Montagne** du 07 juin publie un article intitulé **Un congrès entre espérantistes**, relatant le congrès commun de *Esperanto-France* et la *Germana Esperanto-Asocio*, à Kaiserslautern, en Allemagne.

Source : http://www.esperanto-sat.info/IMG/jpg/2010_06_07_La_Montagne_KL.jpg

Un congrès entre espérantistes



■ *Ouest-France* du 03 juin publie un article intitulé

Un journaliste chinois à la rencontre de Bretons - Plouézec



Zhengming Peng et Li Zhang sont de voyage pour 40 jours en France ; halte obligée : Plouézec. Zhengming parle un tout petit peu français mais très bien l'espéranto ce qui lui a permis de nouer des contacts fidèles.

Entretien

- Qui êtes-vous, en fait ?

J'ai découvert l'espéranto il y a 20 ans. Il est plus facile pour des chinois d'apprendre l'espéranto que l'anglais, mais c'est plus difficile pour ceux qui n'ont jamais approché les langues européennes, particulièrement latines et leur alphabet.

- Et l'espéranto ?

J'ai découvert l'espéranto il y a 20 ans. Il est plus facile pour des chinois d'apprendre l'espéranto que l'anglais, mais c'est plus difficile pour ceux qui n'ont jamais approché les langues européennes, particulièrement latines et leur alphabet.

- Vous venez de rencontrer des espérantistes plouézécains. Pourquoi Plouézec ?

J'y suis venu pour la première fois en 2001, j'y reviens régulièrement et il m'est arrivé de participer à la semaine internationale de l'espéranto. Cette année, nous n'avons pas eu trop de mal à obtenir un visa mais il nous a fallu faire valoir l'invitation de notre fille et de la fédération nationale d'espéranto.

Source : <http://www.ouest-france.fr/actu/>

Rencontres espérantistes d'été :



02-10 juillet: Somera Esperanto-Studado, SES-2010 (Séminaire d'Espéranto Estival), 3^e rencontre des élèves de Lenu.net: cours le matin, excursions l'après-midi, divertissement en soirée.

13-16 juillet: 45e Congrès Brésilien d'Espéranto à Campo Grande (Brésil).



17-24 juillet: 95^e Congrès Universel d'Espéranto à La Havane (Cuba) avec concert exceptionnel du chœur Interkant (étoffé pour l'occasion de 50 autres choristes du monde entier) où sera interprété le fameux Canto General.



01-06 août: 83^e Congrès de SAT à Brasov (Roumanie) avec multiples excursions et forums sociaux (conférences-débats) en espéranto.

09-13 août: 50a Somera Festivalo (Festival Estival) à Barlaston (Angleterre)



13-20 août: FESTO (festival de musique en espéranto) à Toulouse. Nombreux concerts, excursions...

Et aussi:

Bouresse (86, www.kvinpetalo.org),

Baugé (49, www.gresillon.org),

Plouézec (22, 06 98 49 59 82 www.pluezek-esperanto.net),

Saint-Victorien (87, 05 55 36 16 83 spranto@voila.fr),

Sète (34, 04 67 39 16 30 jf.pasarelle@free.fr)...

Qu'est-ce que SAT ? Sennacieca Asocio Tutmonda: Association Mondiale Anationale, fondée en 1921, est une association mondiale de travailleurs et plus généralement de progressistes dont l'activité est centrée sur la culture et l'éducation populaire. Elle utilise l'espéranto comme langue de travail. www.satesperanto.org

Qu'est-ce que SAT-Amikaro ? L'amicale de SAT: l'Union des Travailleurs Espérantistes de Langue Française, fondée en 1945, est l'association espérantiste de langue française qui s'occupe de diffuser et enseigner l'espéranto en francophonie dans les milieux progressistes et permettre ainsi l'accès à SAT. www.sat-amikaro.org

Renseignements Pratiques

Permanence au siège

Lundi 18h30 - 19h30
Mardi 10h00 - 16h00
Mercredi 14h30 - 18h00
Jeudi 15h30 - 18h30
Vendredi 09h30 - 19h30
Samedi 11h00 - 18h00

Cours oraux au siège – pour débutants:

Les lundis 17H30 avec Georges Meilhac
Les mercredis 14H30 avec Hélène Bonjour.
Les samedis 14H00 avec Vincent Charlot

Cours par correspondance d'espéranto : inscription directe auprès de :

C. Gerlat 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble 0476 01 91 71 claud.gerlat@orange.fr

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro, rubrique «Cours d'espéranto»: <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

Service Librairie par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)

Au siège; Net: libroservo@sat-amikaro.org

Contributions pour ce supplément à envoyer :

- de préférence par internet, à lasago@free.fr, en format RTF ou TXT pour un document joint, ou directement dans le corps même du message, et en format TIFF, JPEG ou GIF pour les images.
- éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (les erreurs éventuelles sont à indiquer dans la marge) à envoyer à: **Serge SIRE, La SAGO 85 impasse des Fées 74330 Sillingy**

Renseignements sur l'espéranto:

FRANCE : SAT-amikaro 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
BELGIQUE : Claude Gladys, Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine
SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

LA SAGO. CPPAP n° 0307 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.

Dépot légal à parution.

LA SAGO - Juillet 2010.

Espéranto

vers une culture sociale sans frontières

Nuklea energio... la glavo de Damoklo.

Francio esta la lando kiu plej uzas nuklean energion en la mondo. Neinformitaj, ĉu ĝiaj loĝantoj konscias pri danĝero pendigita super la kapo? Aldoniĝas la tuta kutima aroganteco de la politikaj estroj kaj responsuloj de «EDF/ GDF», kiuj asertas la neeblecon de alia Ĉernobil.

La gravaj sindikatoj, pri tio, faras sian batalĉevalon, en la nomo de la teknika progreso, kaj de la laborokonservado (ne fermi la atomenergiajn centralojn). Koncerne la unuajn, temas pri kruda cinismo, koncerne la aliajn, precipe, ni povas elvoki intencan senkonsciencan.

Necesas senmistifiki ĉiujn paroladojn de la homoj kiuj pretendas sin teknikistoj kiam ni devus atribui al ili la markon de fuŝmagiistoj.

Francio estas la nura lando, en Eŭropo, daŭriganta tiun politikon, dum aliaj landoj reduktas, pli kaj pli, la uzon de nukleaj atomenergiaj centraloj. Iuj oficialuloj antaŭenmetis argumenton, firme asertinte ke en oriento, estis atomenergiaj centraloj, kies funkciado estis tre neperfekta. Tio eblis, ĉar oni dediĉis multe da mono favore al armilaro.

Sed tiu argumento, je la nomo de francaj regantoj estas dubinda.

Ne forgesu la oferon de la popolo por pli komforta vivo, dum koloniaj militoj, pro pretendoj de potencaj regnoj, kaŭzante grandegan malŝparon de publika mono. Ankaŭ, ne forgesu la nukleajn akcidentojn. Okazis silento preskaŭ kompleta, pri tio, en la nomo de ŝtata racio, dum la loĝantaro sian vivon riskis.

1957 - en Windscale (Anglio) - brulego en reaktoro de plutonioproduktado, kun infektado sufiĉe grava en la regiono.

1975 - en Kychtym (Uralo, Rusio) - eksplodo en stokadocentro de forĵetaĵoj kaj endanĝerigo de loĝantoj en mil kvadrataj kilometroj.

1969 - en Lucens (Svislando) - perdo de malvarmigocirkvito de reaktoro por esploro.

1973- en Saint Laurent des Eaux (Francio) - potencosupreniro tro rapida de reaktoro, kompleta fandiĝo de 20 kilogramoj da surradiita uranio kaj grava infektado.

1980 - en la Hague (Francio) - brulego de transformatoro.

Fine en 1986 - ankoraŭ en la Hague, du laboristoj surradiitaj. Tiuj kelkaj akcidentoj indikas kiom estas krima tiu persistemo por kamufli la efikojn de tiu politiko de la magiilernanto en kiuj plezuriĝas regantoj kaj teknikistoj, laŭŝajne.

La tutnuklea energio.

La rekomenco de la nukleaj provoj en Polinezio, far Ŝirako (Chirac), kiu estis decidita, ilustris la povon de sola individuo,

kontraŭ granda parto de la loĝantaro kaj internacia opinio. La sindikatoj ne plenumas la mision por ŝirmi la sekurecon de homoj. Necesas diskonigi tiun specon de agadmaniero, kiel ni devas fari ĝin, laŭdire por «franca armilaro, protektanto de la nacia sendependeco», «75 procentoj de la energio estas nuklea».

Apoge al la pravigo pri tutnuklea energio, la teknikistoj opinias ke se ni seniĝus de tio, la elektro postulus tro grandan liveradon de petrolo. Tamen, la hejtado per gaso estas malpli multekosta ol elektra hejtado.

La nuklea energio nur konstituas 20 procentojn de la energia konsumado, en Francio. Ĝia disvolviĝo celas ŝtatajn subvenciojn (200 miliardoj) de Komisarejo pri Atoma Energio (CEA).

Necesas konsideri ke la reaktoroj maljuniĝos, pro fenomenoj de eluzo, kaj fendetoj. Koncerne la reaktadon, pli da 10 000 tunoj da forĵetaĵoj estas stokitaj en la Hague.

Multe da teknikaj problemoj ne estas solvitaj. La laboristoj ne estas informitaj. Tiel estas ĉar la sindikatoj estas obsedataj, pro laboro, ne konigas al la laboristoj, ĉiujn bazojn de la afero. Ili preferas konservi silente minacojn pri la medio kaj la homa sano.

En Ĉernobil, ankaŭ oni preterlasis la eblajn konsekvencojn. Ĉu ni forgesis tiagrade tion kio poste okazis?

Ĉu la kosto de la reaktoro Superfenikso publike estas konata? Oni taksas inter 50 kaj 100 miliardoj. Estas senpene diveni ke neniam tiu kosto estos sciigita. Se tiu informo publikiĝus, tio estigus manifestaciojn, kaj kontestadon pri la tuta suicidema politiko, ĝis nun. Por fini pri la nuklea politiko, gasgeneratoroj (varmo kaj elektro), estas pli malmultekostaj rimedoj. Necesas elekti la sekvantajn solvojn:

Sin turni al la gasa centralo
Forlasi la elektran hejtadon.
Nutraĵo de varmoretoj.
Mastrumado de energio.

Pli kaj pli estas evidente ke ĉiuj politikaj movadoj defendantaj la nocion de respekto de la medioj devu informi kaj sciigi. Aliaj fontoj de energio ekzistas. La eliro el nuklea energio eblas laŭ ekonomia vidpunkto. La elspezoj por energia sektoro riĉigas plurnaciajn firmaojn, kaj estigas kuradon por profito.

Richard Westall - Sergi Sir



Renovigeblaj energioj povas krei multe pli da dungeblecoj ol petrolo kies fontoj de provizoj malpliigiĝos, ĉar ili estas dependaj de hazardaj eventoj.

La informo maltrafas ĉar la povoj kaj kapitalistoj tion malpermesas. Krome la nuklea energio estas kosta. Tio havas kaŭzon por prognozi milojn da kanceraj, genetikajn misformaĵojn.

Tiel, jam antaŭe, oni favoris aŭtentikajn genocidojn... pro mono, profito, por ke malplimulto povu vivi.

La silento de la amasinformiloj (gazetaro-televideo) estas krima, ĉar ĝi estas la neado pri plena deontologio.

«Lau ekologia vidpunkto, la homaro frontas gravajn klimato-ŝanĝiĝojn. Ĉiujare, la teruraj tragedioj kiel la malsato, misnutrado mortigas milionojn da vivuloj. Nenombreblaj bestoj kaj vegetalaj specoj riskas la estingiĝon, pro senarbariga ekspluatado kaj acidaj pluvoj». (Muërray Bookchin, en «Une société à refaire»... eldono de Ateliero de Liberecana Kreado).


Tiuj kelkaj skribaĵoj de la usona liberecana ekologiisto ebligas elmontri la danĝeron, por la homaro, de la senskrupula regado super la naturo.

Profani la naturon, ĉu ne elkliki procezon nereturneblan? «la tero apartenas al la homoj» (la Internacio).

Konsekvence gravas ke kiel eble plej da homoj estu informitaj ke la uzo de la nuklea energio, samtempe, estas glavo de Damoklo super ĉiuj, kaj neado de la progreso.

Louis Gohin.

Lino Markov'



Legindaj Legendoj

La Neatingebla Monto.

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el ĉiuj kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj.

Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

Unu el la plej tipaj montoj en nia Daŭfenio estas nomata «Kudrilo», kvankam ĝi similas gigantan molaron. Ĝi ne tre altas, sed de malproksime, oni rimarkas ĝin ĉe la nord-al-suda klifa barilo, oriente de la montaro Verkoro.

En la jaro 1492 Kristoforo Kolumbo malkovris la novan kontinenton Ameriko kaj unuafoje en la mondo, homoj surgrimpis malfacilan kaj timigan monton, celante nur scivolemon¹, plezuron, fakte sporton. Grupo da kuraĝuloj venkis la Neatingeblan² Monton.

La reĝo Karolo la 8a, dudekjara, ŝatis Daŭfenion kaj iam pilgrimis al Embruno. Mirigita de tiu impona monto, kiun la kamparanoj prave taksis neatingebla, li ordonis al unu el siaj oficiroj, Antonio de Ville, fari ĉion necesan por ekscii, kio okazas sur tiu kurioza supraĵo, ŝajne vasta kaj glata. Terura projekto, ĉar laŭ la regiona loĝantaro, tie vivas nur birdoj kaj koboldoj³. Antonio de Ville ne povis rifuzi. Monatojn li bezonis ĉar alpismo ankoraŭ ne ekzistis. Oni eĉ ne imagis akrobatan kaj senutilan⁴ grimpadon. La veraj venkintoj estis Reynaud Jubée (reno jube), oficiala reĝa eskalisto⁵, la ĉarpentisto Pierre Arnaud (pjer arno), la lignajistoj kaj la muntistoj de multaj eskaloj kaj ŝnuroj, kaj ĉiuj homoj, kiuj partoprenis en la farado de centoj da metroj de diversaj grimpiĵoj.

Kiam la tuta eskalaro estis lokigita, Antonio de Ville suprengrimpis kun naŭ kuraĝuloj, inkluzive de kvar ekleziuloj⁶. Ili atingis la supraĵon la 27-an de junio 1492. La *mons inascensibilis*, la neatingebla monto, estis venkita. Francesko de Bosko verkis protokolon. Li raportis la tiean ekziston de «ĉam-garenoj», mirinda detalo, se konsideri⁷ la altajn vertikalaĵojn ĉirkaŭ la supraĵo. Antonio de Ville sendis leteron al la prezidanto de la Parlamento en Grenoblo, por postuli aktiston, kiu konstatos kaj atestos la grandfaron⁸. Oni celebris meson, la 28-an. La grenoblaj leĝistoj alvenis piede de la monto, sed la vido de tiel altaj muregoj timigis ilin. Ili volis forkuri. Fine, de malsupre, ili redaktis konstatdokumenton pri la sukceso de la grimpiĵoj. La unuan de julio, kelkaj pliaj vizitantoj ankaŭ surgrimpis, inkluzive de sinjoro Guigues de la Tour (gig de la tur), kastelano en la apuda regiono Trievo. Ili kunportis kuniklojn, kiuj trankvile ekmanĝis la mallongan herbon. Post ses tagoj, la tuta grupo decidis retiriĝi. Ĉiuj malsupreniris sen akcidento, sed ne sen kelkaj malfacilaĵoj.

Poste, neniu denove provis la aventuron dum tri jarcentoj kaj duono. La 16-an de junio 1834, la ŝafgardisto⁹ Johano Liotard aŭdacis kaj sukcesis la duan grimpadon, sole, sen ia teknika helpo.

Klod

Notoj:

1	scivolemo	emo voli scii	<i>curiosité</i>
2	ne-atingebla	kiun oni ne povas atingi	<i>inaccessible</i>
3	koboldo		<i>farfadet, lutin</i>
4	senutila	sen utilo	<i>inutile</i>
5	eskalisto	profesiulo pri eskaloj	<i>«eschelleur du roy»</i>
6	ekleziulo	ulo de eklezio	<i>homme d'église</i>
7	se konsideri	se oni konsideras ĝenerale	
8	grandfaro		<i>exploit</i>
9	ŝafgardisto	homo, kiu gardas ŝafojn	<i>berger</i>

Kontribuo al Vikipedio

Raphaël Elizé

Male al nia kutimo, la ĉi suba artikolo jam konsistigas paĝon en EO:Vikipedio. Pro la interesa temo, kaj ĉar ĝi ĉefe estas traduko de kunlaboranto de La Sago, ĝi tute logike havas lokon ĉi tie.

La redaktaro

Raphaël Elizé (Rafael' Elize') estas franca politikisto, naskiĝinta en *Lamentin*, Martiniko, la 4an de februaro 1891, mortinta en Buĥenvaldo la 9an de februaro 1945.

Raphaël Elizé alvenis al Francio kiam li estis 11-jara, tuj post la katastrofo de la monto *Pelée*, ĉar liaj gepatroj eskapis el *Saint-Pierre* ĝuste antaŭ la eksplodo. Li vizitadis parizajn liceojn, kaj studentigis en 1910 en la Nacia Veterinara Supera Lernejo en Liono. Li ricevis sian diplomon unu monaton antaŭ la eko de la Unua Mondmilito. Li servis en la kolonia infanterio unue kiel soldato, poste kiel veterinaro. Pro sia kuraĝo, li ricevis la Militan Krucon.



Li ekpolitikis en 1924, kiam li aliĝis en la Laboristan Internacion (SFIO) en *Sablé-sur-Sarthe*, urbo de la departemento *Sarthe*. Malsukcesa kandidato ĉe la urbaj balotoj en 1925, li finfine iĝos la unua negra urbestro en metropola Francio: fakte, en 1929, *Sablé-sur-Sarthe* elektis la unuan antilan urbestron de metropola komunumo.

La elekto de tiu negra veterinaro ne estis bagatela sukceso en tiu jaro 1929, kiam leviĝis la netoleremo. Sukceso des pli rimarkinda, ke Rafael Elize estis socialisto. Tiel li realigos por sia urbo *Sablé-sur-Sarthe* gravajn projektojn (komunuman kantonon, futbalteronon kaj eĉ la unuan aŭtentigitan naĝejon en la okcidenta Francio).

En 1939, li estis mobilizata kiel veterinaro en *Hirson* (departemento *Aisne*). Malmobilizita en 1940, li rehejmeniris en *Sablé* kaj insiste petis de la prefekto la restitucion de sia urbestreco. Al kio la «*Feldkommandantur*» objetis: «Nekompreneblas por la germana sento, nek por la germana juremo, ke oni povus investi neblankulon je la urbestra ofico»

Eksigita, Elizeo reprofesiis kaj partoprenis en la Franca rezistado, interalie transdirante la informojn, kiujn li povis akiri kiel veterinaro... de la *Kommandantur*. Denuncita kaj arestita en septembro 1943, li restadis kelkajn monatojn en la malliberejo de Anĝero, poste en militkoncentrejo apud *Compiègne*, kaj oni deportis lin en Buĥenvaldo la 19an de januaro 1944. Grave vundita dum la bombado fare de aliancanoj de la germana armfabriko *Gustloff-Weimar* la 9an de februaro 1945, li mortis en Buĥenvaldo tiun ĉi vesperon.

Du monatojn antaŭe li preĝpetis: «Bona Dio, ili mortigu nin ĉiujn kaj la tero estu liberigata de tiuj sovaĝuloj!».

Memore al la netipa irvojo de *Raphaël Elizé*, la urbodoma placo de *Sablé* portas lian nomon ekde la fino de la milito.

En 2010, la franca televido pretigas filmon pri la vivo de *Raphaël Elizé*.

Adaptis el la responda artikolo en FR:Wikipedia, JoLoKo
http://eo.wikipedia.org/wiki/Raphaël_Elizé

PROMESO
EN
obskuro



- IEM -

ORIGINALA LITERATURO



Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempo, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.

Promeso en obskuro novejoj de Manuel de Seabra

Vieno: IEM 1997, 105 paĝoj, 13 €.

Profesiaj verkistoj bedaŭrinde ne abundas ĉe ni. Manuel de Seabra verkis tridekon da romanoj, poemoj, novelaroj en la portugala kaj en Esperanto; aperis tradukoj de liaj verkoj en la kataluna, rusa, ukraina kaj ĉina. En Esperanto jam aperis *La armeoj de Paluzie* (1996), *La tago kiam Jesuo perfidis Judason* ((2001), *Ĉu vi konas Blaise Cendrars?* (2007) kaj *Malamu vin unu la alian* (2009); li ankaŭ verkis eseon *Ĉu nur unu civilizacio?*

(La KromkancerKliniko 22, 2007). Laŭ mi, kaj i.a. Spomenka Štimec, Manuel de Seabra estas unu el niaj plej valoraj verkistoj.

Elrecenzo de Claus J. Günkel: Alia nomo por tiu novelaro el manuel de Seabra povus est *Putinoj*, aŭ eĉ *Geputinoj*... «Ĉi tiuj rakontoj, almenaŭ miaopinie, tute ne estas malmoralaj aŭ eĉ erotikaj», prave asertas la verkinto. Aŭ ĉu iu leganto trovas ion malmoralan en la nuda vereco? Aŭ ĉu li aŭ ŝi trovas

ion erotikan en senlaboreco, vidveco kaj orfeco, en vundoj, sango aŭ en mono? *Promeso en obskuro* bruske fortiras la kovrilon de la violentita kadavro, fortiras la sparadrapon de la vundo kaj krias al niaj oreloj la historion de la homoj, kiujn ni pretendas ne vidi. Manuel de Seabra prilumas, atentigas kaj malfermas – senkompatate, senindulge kontraŭ la legantaro gapema.

Jak Le Puil

Jen nun ekstrakto de la novelo «Haringoj por Julieta». Julieta ne tro ŝatas iri en la apartamenton de siaj klientoj, sed ja tiu ĉi promesis dek biletojn...

Li turnis sin kaj alrigardis ŝin intensive, fikse. Poste li kliniĝis kaj, el tirkesto de la peza bufedo ĉe la pordo, li prenis ion, kio teruris ŝin. Ion longan, mallarĝan, brilan.

«Ne timu.» li diris, kvazaŭ divenante ŝiajn pensojn. «Tio ĉi ne estas tranĉilo nek ponardo. Ĝi estas nur fiŝo, simpla fiŝo. Ne moviĝu. Lasu, ke mi trafu vin per ĝi.»

Nun la viro havis basan, varman voĉon kaj levis la brakon. La ponardo-fiŝo traboris la aeron kaj ŝin atingis meze de la frunto. «Ĉi tiu kato celumas akurate», ŝi pensis. La fiŝo dispecetiĝis kaj plenigis ŝian vizaĝon per fragmentoj de peklita haringo.

«La Putinido.» pensis Julieta. «Ĵetas haringojn!»

Sed ŝi ne moviĝis. Por dek biletoj li ja certe povus ĵeti ĉiujn haringojn de l' mondo. Ja estas preferinde ol postuli suĉadon aŭ ke ŝi faru ian alian perversiaĵon.

Denove haringo flugis ĝis unu el ŝiaj genuoj kaj ĝin akompanis ĝemo de la viro, kiu, ĉe la fenestro, jam denove levis sian brakon, svingante pli da fiŝoj, kiuj flugis ĉirkaŭ ŝi kvazaŭ rapidaj fulmoj de psikedela lumo. Kaj ĉiufoje, kiam haringo ne tuŝis ŝin, la viro kuris, reprenis la fiŝon kaj ĝin denove ĵetis. Li estis ruĝa, febra, ĝemis pro ekscito. Por ne ridi, Julieta fermis la okulojn. Ŝi sentis la haringojn

saltantaj ĉirkaŭe kvazaŭ ponardoj de cirkjetisto, kaj akra fiŝodoro iom post iom plenigis ŝiajn naztruojn. Ŝi malfermis iomete la buŝon kaj metis la langon eksteren, lekis siajn lipojn kaj sentis intensan guston de sekigita fiŝo. En tiu momento ŝi aŭdis mal-esperan ekkrion kaj malfermis la okulojn. Ĉirkaŭ la seĝo, sur la planko, estis amaso da pecoj de haringoj kaj la viro kuris direkte al ŝi kun fiŝo en la mano kaj ĝin metis inter ŝiajn koksojn. Ŝi sentis la haringan malvarmon sur la haŭto kaj novan ondon da mordanta odoro, kiu sufokis ŝian nazon. Sed la viro surgenuiĝis jam antaŭ ŝi kaj ĝemegadis tra la distordoj de soleca, intensa, prokrasta, stertora orgasmo. Ŝia profesia sperto konsilis, ke ŝi restu senmova ĝis kiam, iom poste, plorante, svingante sian tutan korpon pro singultoj, la viro kliniĝis kaj komencis manĝi la salitan fiŝon de ŝia interkokso. Li manĝis per grandaj mardoj miksitaj kun larmoj. Kaj tiam Julieta ne plu povis sin teni firme kaj io okazis, io, kio jam ne okazis al ŝi ekde multaj, multaj jaroj, ŝi preskaŭ jam ne memoris ekde kiom da: subite ŝi ĝemis senkontrolate, la mondo bruske rompiĝis, kaj ŝi kulminis profunde, ekterurita. Ŝi tordiĝis kun paroksismo kaj impeto, longe, dolore, ĝis fine ŝi falis en lacan sinforĝeson.

«Mi nur petas, ke vi sidiĝu sur ĉi tiun seĝon kun la kruroj disaj kaj tute senmova. Nenio pli.»

Nun ŝi finfine sciigis pri lia manio.

«Kiam mi finos, diru nenion, vi povos iri rekte al la banejo. Tie vi trovos ŝaŭmobanon kaj ĉiaspacajn parfumojn.»

Ŝi ne plu klopodis kompreni. La plej bona klarigo estas la dek biletoj, kiuj jam estis en ŝia mansaketo. Kaj, decidite, ŝi komencis sian lantan striptizon, kun erotikaj intencoj. Sed li estis ĉe la fenestro, distre, fumante, kaj rigardis eksteren. Julieta ŝultrotiris, hastis, kaj tuj estis nuda, paŝis senbrue ĝis la seĝo kaj sidiĝis precize kiel la viro ordonis, fronte al la fenestro. Nun ŝi sentis sin konfidema. La dek biletoj jam estis en ŝia mansaketo. Indiferenta al la strangaj plezuroj de tiu viro, ŝi estis preparita por ĉio. Nenio vere surprizis ŝin.

Ŝlosila anekdoto

Kelkaj kongresanoj rimarkis nian domveturilon parkumita apud la kuirejo de la kongresejo. Ĉiun noktomezon mi devis kontroli, ŝlosi la kongresejon, kaj ĉiun frumatemon, je la kvina kaj duono, «Nassima» bezonis uzi la kongresejan ŝlosilaron por komenci la preparadon de la manĝo.

Alia funkcio

Jam dum la tuta tago mi iris ien kaj tien tra la kongresejo kun ŝlosilaro kiel kolpendaĵo kaj mi tute ne bezonis kunporti enpoŝe la mian personan.

Krome estis praktike: kiam iuj kongresanoj bezonis ripozi ĉe la kongresejo, ili petis permeson de ni, kaj rekte iris siesti en nia domveturilo.

Fine de la kongreso, post la adiaŭoj ni pretis por ekreveturi hejmen.... sed nia

domveturilo malkonsentis! Ĝi ne deziris forlasi la kongresejon! Ĝi pretekstis perdon de ŝlosiloj, kaj ni konstatis ke ĝi pravis. Do, ie, iam....

La morgaŭon

Kiam la kongresintoj ekskursis «Okcidenten kaj Orienten» mi trairis Hilionon «Okcidenten kaj Orienten» esplorrigardante ĉiujn hilionajn centimetrojn, vane.

Jean-Luc, la respondeculo pri la centro «Georges Palante», aldonis la fakton, ke nia veturilo estis parkumita sur ŝtopitan kloakfaŭkon, kaj konsekvence la urboservoj alvenos por ĝin malŝtopi... «Franjo vi ĝenas!»

Ĉagrenita mi tuj rehejmeniros, kiam io okulfrapis min, ŝlosilaro kuŝis surtere... sed bedaŭrinde ne estis mia! «Kies ŝlosilaro? - mi demandis al la telefonrespondilo de Jean-Luc.

«- Se iu ŝercas ĝin, mi kunportas ĝin hejmen en San-Briego, kvankam mi ne retrovis mian personan.... mi revenos poste por repreni la domveturilon».

Hejme, spitite, mi elpakis ĉiujn uzitajn aferojn el la sakoj sur la hejman tablon kaj miraklo! funde de iu sako reaperis mia ŝlosilaro (mi ne kulpis pri tio, certe temis pri kobolda afero!).

Tuj mi alvokis nian kamaradon Jean-Luc, por anonci al li la «bonan novaĵon», kaj samtempe mi priskribis al li la alian trovitajn ŝlosilojn, kiujn mi havis hejme.

Kredu min! Li ekridegis respondante «Fek! Ili estas miaj! Kiel mi elturniĝos por rehejmeniri? Mi estas tiel laca post tiu kongreso!».

Franjo

Plu el Iliono

En nia leterkesto

...Mi volas diri ankaŭ ke, ekde nia renkonto en Parizo lastan septembron, mi lernadis pli da detaloj pri la esperanto-movado «neŭtrala» kaj la esperanto-movado maldekstrema/progresema/SAT, pri kiu vi min informis. Vi pravis! Estas granda diferenco inter la du movadoj; min tre interesas la movado maldekstrema, kaj min nur iomete interesas la alia. Kaj ankaŭ, mi volas diri ke min surprizas ke ne ekzistas multaj retejoj aŭ publikaĵoj similaj al La Sago. Mi tre ŝatas La Sagon -- sed, kial aliaj grupoj aliĝintaj al SAT ne publikigas revuojn kiel ĉi-tiu? Ni bezonas pli interŝanĝi inter la maldekstremuloj de la tuta mondo, sed malfeliĉe, mi ne trovis la nombron de mediatroj (revuoj, bultenoj, retpaĝoj, blogoj, ktp) kiun mi atendis. Sed, gratuloj al vi en SAT-Amikaro por la kvalito de La Sago.

Kevin, anglalingva Kanado, eo-komencanto.
Ricevita kaj transdonita de Vito Makovo.

Raporto de Helene Caous (Plouezec)

Mia tasko? Animi trilingvan atelieron, kun helpo de amiko Per (Petro) kiu bonege komprenas Esperanton, tamen ne povas aŭ ne volas esperante paroli. Li legas, skribas, kaj parolas facile la bretonan lingvon. Do, mi devas traduki! Neniam mi estis instruistino!... Neniam lernis pedagogion!... Mi devis krei mian propran metodon!... Do, antaŭe, hejme, mi kolektis, tradukis amuzajn trilingvajojn: proverbojn, divenajojn, demandojn,

infanajn poemojn kiujn mi skribis antaŭe...

Mardon la 6an de aprilo okaze de la tuttaga ekskurso, ĉiuj povis admiri, imagi, komenti la diversajn kreaĵojn de Marie Eon. Tra la fantastaj bildoj, vi povis imagi laŭ viaj propraj revoj, aŭ viaj ribeloj kaj eniri en la fantomadan rondon. Se vi petis de Marie, bonvole ŝi klarigis pri unu aŭ alia skulptaĵo, rakontis sian lukton kontraŭ la ligno, sian neatenditan helpon kiam la trunkoj malkovris truojn, fendojn, ĝibon aŭ tuberon kiuj gvidis sian laboron aŭ fantazion.

H.C.

SAT-Amikara Kongreso kaj Liberpensa Bankedo

Tute ne rilatas, sed la kongreso de SAT-Amikaro okazas ĉiam dum la semajnfino de Pasko kaj la bankedo de la liberpensoj okazas en la vendredo laŭdire «sankta» (antaŭvespere de la kongreso).

Post mia partopreno en du kongresoj, mi konsciis, ke mi ne povis partopreni en la liberpensaj bankedoj organizitaj en mia urbo.

Do, dum la kvin postaj kongresoj mi bankedis kun la liberpensuloj de la kongresa urbo kaj mi ŝatis, ke kelkaj

kongresanoj partoprenis kun mi.

Je la paŭza kongreso, dudek unu kongresanoj partoprenis en la bankedo dank' al bonaj informoj en «La Sago» kaj duonpaŝa alvoko en «La Raison». Mi ŝatus, ke tio iĝu kutima.

Kiel mi, kelkaj esperantistoj estas liberpensuloj, kelkaj aliaj estas simpatiantaj. Inter ili multaj alvenas la vendredon por ĉeesti en la malfermo de la kongreso. La bankedo ebligas pasigi agrablan vesperon.

Necesas aldoni, ke multaj kongresanoj estas for de siaj hejmoj: ili alvenas el ĉiuj francaj regionoj kaj ankaŭ el aliaj landoj.

La liberpensuloj de la kongresa urbo informu en «La Sago», je la eko de la jaro, pri la antaŭvidata bankedo, kaj poste

precizigu en la sekvantaj numeroj de «La Sago».

Se oni anoncas la bankedon nur la antaŭan semajnon, estas trafe por la tieaj enloĝantoj sed ne por tiuj, kiuj venas de malproksime.

La venonta kongreso de SAT-Amikaro okazos ekde la 23a ĝis la 25a de aprilo 2011 en Sète (34200). Estus bone, ke oni tie organizu la bankedon de la liberpensoj en la vendredo 22a de aprilo 2011.

Mi pritraktos tiun temon dum kelkaj minutoj okaze de la liberpensa kongreso, kie mi ekparolos inter la deka kaj la dekdua horoj la ĵaŭdon 8an de julio 2010.

Henriko Graven (Paŭo)

Montruĝo (92)

Varbadaj strategioj

La 29an de majo okazis (4-hora!) kunveno iniciatita de UFE, kun iom pompa titolo: «États généraux de l'espéranto».

La celo estis «interŝanĝi ideojn pri kiel promocii k disvastigi Esperanton je loka, regiona k nacia skaloj». La 300-lokan amfiteatron okupis ĉ. 50 homoj, preskaŭ ĉiuj jam esperantistoj. Al la kunveno estis kore invititaj ĉiuj fakaj esperanto-asocioj de Francio (fervojistoj, katolikoj, EDE...) k do ankaŭ SAT-Amikaro.

Post konciza prezento de la lingvoproblemo en EU sekvis skizado de la tri ĉefaj varbstrategiaj ĉeflinioj pri esperanto:

- desubismo: ekzemple la baza varbado en urba asociado ĉe budo,

- desuprismo: ekzemple la strebo voĉdonigi leĝproponon por akcepto de esperanto kiel nedeviga kromfako de la abiturienta ekzameno,

- deflankismo: ekzemple akiro de subtentoroj de lingvisto, eĉ se ne tro konata, sed kies kompetenteco en propra fako imponas.

Restis resumi la strukturiĝon de la e-movado en Francio per sinprezento de la ĉeestantaj asocioj (mi do reprezentis SAT-on k SAT-Amikaron, prezentante interalie la nunan ambician produktadon de la dokumentfilmo pri Eo).

Kvankam la individua iniciatinto de la aranĝo grumblis k lamentis pro laŭ lia takso ne kontentiga dispropagando de Eo, kies progresomalrapidon li ne komprenas, kvankam mem ne jam praktikas la lingvon (!), la diskuto tamen interese disvolviĝis inter la partoprenantoj, kiuj prezentis proprajn varbmetodojn. Teatrosiaĝoj, eldono k «sovaĝa disdonado» de malmultkoste produktata paĝosigno kun mencio aversa «ESPERANTO Langue internationale équitable» k reversa «esperanto.net», Esperanto-trinkejumadoj (Café Espéranto) en publikaj trinkejoj, kiuj sukcese okazadas unufoje monate de nun unu jaro...

Konklude estis iom pripensite kiel en Pariza regiono eblas kunordigi la eventojn por ekzemple havi fortan dejorskupon dum la budo de la HomarFesto k utiligi la parizajn sidejojn okaze de la Eo-trinkejumadoj. Planota/inda estas simila kunveno post ĉ. unu jaro, por konstati la agadojn faritajn k plani/organizi/diskutigi pliajn.

Raportis Vito Markovo helpe de skribaj neoficialaj notoj de Natalio Baraŭso (ĉar bedaŭrinde ne okazis oficiala protokolado!)

Esperantistoj aktivas

Stella Plage (62)

La 22a Eŭropa Rendevuo disvolviĝos en **Stella-Plage** apud Tuketo (*Le Touquet*), la 13an-14an de novembro 2010.

La renkontiĝo okazos en tre komforta feriejo, ĝi proponos kvinnivelan kursaron: de komencantoj ĝis la preparo de la Eŭropaj Referencndraj ekzamenoj (gvidotaj de eminentaj instruantoj), kun Lingva Festivalo kaj koncerto de Kajto.



Informoj: <http://arrasesperanto.free.fr>

Informas Edmond Plutniak

Parizo (75)

La 29an de majo, SAT-Amikaro, kiu oficiale subskribis la alvokon de la Amikoj de la Pariza Komunumo, ĉeestis reprezentite de Luiso Goheno [Louis Gohin] por la supreniro al la muro de la federuloj. Notindas, ke la tiutema libreto eldonita de SAT-EFK k kies enhavon parte fontas el ĉi asocio aperos en dua reviziita eldono ĉi somere.

La 15an de junio okazis iom aparta piknika «Apero Esperanto» (eks-→Café

espéranto») kiu kunigis esperantistojn ĉirkaŭ boato de Rolando Ŝnel' [Schnell], esperantisto portempe ankrinta apud Bastilo k kiu travadas ŝipe Francion.

La 19-20ajn de junio okazis en La Ĉerizejo ekzamen-sesio de FEI pri unua k dua gradoj kun 5/6 kandidatoj ambaŭkaze, k preskaŭ ĉiesa sukceso. Notindas cetere ke FEI havas novan retejon: <http://franca-esperanto-instituto.net/>

Jambvilo (78)

Okazos de la 16a ĝis la 22a de aŭgusto en Jambvilo (*Jambville*) jara renkontiĝo de SEL («*Systèmes d'Échange Local*» en la franca) aŭ en esperanto, LIS («Loka Interŝanĝa Sistemo»).

Persone, la mardon 17an, mi prezentos la filmon «*Esperanto estas*» kaj proponos debaton pri la temo «Egalrajta internacia komunikado».

Sekvos, vendredon la 20an, ateliero por tiuj kiuj scivolemas pri la lingvo kaj deziras gustumi ĝin.

Pliaj informoj ĉe: <http://intersel.apinc.org/spip.php?article1111>

Informas Elizabet' Barbajo (Barbay)

SAT-Amikaro proponas staĝon:

«Komputiko en Eo»

En tiu staĝo, vi instalos Ubuntu 10.04, eventuale en vian komputilon.

(Instalo - Esperantigo - konfigurigo - akordigo - aldono de programoj...).

Ni ankaŭ enkondukos la konceptojn de: liberaj programoj, GNU/Linux...

Lerni/uzi fakajn terminojn estos parto de la staĝo

Se interesas vin, -skribu al:

libroservo@sat-amikaro.org

aŭ
SAT-amikaro Esperanto
Komputiko en Eo
132-134 Bd. Vincent-Auriol
75013 Paris

aŭ alvoku vendrede: 01 44 24 50 48

(Pri datoj kaj lokoj, oni decidas inter la interesitoj kiuj sin anoncos)

Zorgas pri, kaj komunikis: Phil'

Pirataĵoj

Ĉe la galo

ekster seria pirata parodia epizodo Far Lino



La pirata versio, far Eo-Asocio de Gojaso <http://go.esperanto.org.br/p/>

Neniu estas profeto en sia urbeto^Z

La aventuroj de iu T-CHE-mizo

En 2007, SAT-EFK surmarketigis T-ĉemizojn, inter kiuj, la ĉi sube videblan «VIVU CHE METODO». Tiu produkto ne diskrete eniris en la SAT-mediojn, vekante ridegojn ĉe la ŝatantoj de facilaj ŝercoj, kaj furiozon ĉe la defendantoj de «Esperanto estas tro grava afero por ke oni risku amuziĝi per ĝi». Tiu T-ĉemizo eĉ ricevis malpermeson ĉeesti la elmontran fenestron de la SAT-amikara sidejo...

Ĝi tamen uziĝis en La Sago 56, kaj kovrilpaĝe por Sennaciulo en novembro 2007, kies temo estis «Latin-Ameriko». Ja efikis reklamo, ĉar brazila grupo, senĝene piratis ne nur la ideon, sed eĉ la bildon kaj la moton, sen ia ŝanĝeto.

Ni ne plendu, kaj deziras al ili bonan sukceson: SAT-EFK ne reldonis tiun T-ĉemizon por eviti novan polemikon, do tio ne konsistigas konkurencon, sed male, iamaniere, konsistigas komplimenton: ja oni piratas nur tion, kio valoras, ĉu ne?

Sergo S.



La SAT-EFK-T-ĉemizo



...kovrilpaĝe en S-ulo 09/07

...en La Sago 56, uzita de anonima SAT-Amikaranino...

Ĉe la lago...

ĉi numere, Lino trovis ĉi-epizodon de «Ĉe la lago». Ŝajnas ke tudas lin la du lagulinetoj, kiujn li sendis iom krude «ad patres» (praaven)....

Normalan situacion vi -eble- retrovos en onta numero...